

Detlev von Liliencron,

## Amkanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Forlasite mi ĉagrenas,  
 En soleco sidas mi.  
 Ĉiujn homojn abomenas  
 Mi, min mem ne plu komprenas;  
 Venu, dolĉulin' al mi.

Verdaj branĉoj, ĉiu floro  
 Min klinigas ja al vi,  
 Ardas mi pro am-fervoro,  
 Brulas por vi mia koro,  
 Venu, dolĉulin' al mi.

Estas daŭre mi pensanta  
 Nur pri vi, ho karulin':  
 Ĉasta amo baraktanta <sup>2</sup>  
 Kontraŭ am-avid' konstanta –  
 Dolĉulin', kompatu min!

*Traduko de la Germana poemo "Liebeslied" de DETLEV VON LILIENCRON (\*1844-06-03 – †1909-07-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2005-05-08.*

*MR-458-1 / Arg-414-821 (2007-05-10 10:10:56)*

*La germana-lingvan originalon de tiu ĉi poemo mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo [www.creative-edesign.com/nordseeinsl\\_pellworm/pellworm\\_liliencron\\_vor\\_tagesanbruch.php](http://www.creative-edesign.com/nordseeinsl_pellworm/pellworm_liliencron_vor_tagesanbruch.php).*

---

<sup>2</sup>aŭ: Ĉasta amo luktadanta  
 aŭ: Ĉasta am' en mi luktanta